

	<h1 style="color: green;">PENSEO</h1>	<p style="color: green;"><i>N-ro 125</i></p> <p style="color: green;"><i>Marto/2002</i></p>
	<p style="color: green;"><b>Monata Beletra Revueto en Esperanto</b> <b>Honorita de Premio Grabowski, 1994</b></p>	
<p style="color: green;">Fondita en 1990; Enretigita en 1997 <a href="http://www.anteo.domainvalet.com" style="color: green;">www.anteo.domainvalet.com</a></p>		

## La Vojo de Mi Irita

de **Risel Zhao Qing**

Pli poste mi revenis al Guilin pro mia malsaneco kaj dume komencis korespondi kun s-ro Paŭl Glöckner (Pirna) kaj Helmut Löffler (Mittweida), Gerd Schonfelder, Giso Brosche en DDR sinsekve, kio daŭris dum kelkaj jaroj.

Ekde 1957, ĵus kiam Prezidanto Maŭ vizitis Sovetion por celebri la 40-jaran Jubileon de la Oktobra Revolucio, mi ekkorespondis kun Prof. Andrej Semenov en Jaroslavl. Li estis tre amika al Ĉinio kaj estis aktivulo de loka Soveti-Ĉina Amikeca Asocio. Kaj sub lia klopodo oni okazigis plurajn ekspoziciojn pri Ĉinaj diversaj atingoj en konstruado kio multe diskonigis kaj intensigis la komprenon inter niaj du popoloj.

Dume mi kaj k-do Pingjio Yang sendis leteron al la estimate s-ano Chen Yuan informigante pri la tiama stato de Esp-Movado kaj ricevis lian tujan respondon, kio multe inspiris min.

Dum la Kultura Revolucio, ĉiuj Esp-aktivadoj estis inter-rompitaj ĝis la 13-a de septembro de 1979 kiam sur la Popola Ĵurnalo publikiĝis artikolo de la veterana s-ano Ye Junjian (Cicio Mar) *La Idealo kaj Realo de Esperanto*, kio do simbolis la denovan prosperon de Esp-Movado dum la nova epoko de Reformado kaj Malfermo. En nia vico sinsekve ekmeriĝis multe da junaj adeptoj. Sub la subtenado de la Provinca Sekretario k-do Qiao Xiaoguang, en decembro de 1982, fondiĝis ankaŭ la Guilina Esperanto-Asocio, kies direktoro estis s-ro

Zeng Dingzhi, kaj mi estis elektita kiel vicestro. Kaj la Ĝenerala Sekretario estis s-ano Liu Shaozhong, tiama vicestro de fremdlingva fakultato kaj nuntempe profesoro (postdoktoro) kaj dekano en la Guangxia Normala Universitato, kaj planas fondi esplorcentron de Esperanto en Guilin.

Je la unua de aŭgusto de 1988, por festi la 60-an jariĝon de la fondiĝo de PLA, sur la *Ĵurnalo de PLA* publikiĝis la oficiala teksto de la Marŝo kiu alinomiĝis al *Himno de la Ĉina PLA*, fare de decido de la Centra Komitato de Militaj Aferoj, kiu do ebligis la tradukon.

Post nelonge mi partoprenis la Duan Internacian Akademian Konferencon pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazigitan en Pekino kaj tial havis la ŝancon esti instruita de la estimate akademianoj Laŭlum kaj Seimin sinsekve, kiuj donis al mi valorajn helpojn kaj admonojn. Dank' al iliaj kaj alies proponoj mi faris la necesajn reviziojn por la provtradukaĵon finfine, plenuminte mian deziron.



En la jaro 1999, okazis en Guilin la Kvara Kongreso de Esperanto, estis tre bedaŭrinde tamen por mi ke, pro mia malbona sanstato ke mi suferis apopleksion ekde 1995, mi povis ĉeesti nur la inaŭguron en la 17a de aŭgusto kaj aŭskultis raportojn fare de Prezidantino s-ino Tan Xiuzhu kaj de la Ĝenerala Sekretario s-ano Yu Tao, dume ĉiuj aliaj aktivadoj estis por mi neatingeblaj krom

librodonacado dum la malfermo en kiu mi petis s-ron Zeng Dingzi transdoni por mi donaci 5 ekz. da E-aj libroj al la E-a Biblioteko, kaj pli poste s-ano Sesdek jam sendis al mi dankleteron pri tio.

Sekve de la progresado de la afero de reformado kaj pordomalfermo, nia asocio adaptiĝas al merkata ekonomio. Ŝanĝiĝas ankaŭ la valora vidpunkto de ĉiu ano. Ĉu ankoraŭ restas necesa por la ekzisto de justeco kaj idealo aŭ ĉio rajtas ekzisti nur pro la ekonomia efiko? En ligva flanko nuntempe troviĝas iuj kiuj arogante insistas, ke ĉiuj parolu anglan lingvon kaj asignas al la gazeto por lernigi anglan lingvon la nomon de *Outlook* kiu signifas prosperon. Ĉu oni volas per tio intencas kuraĝigi la hegemoniistojn por efektiviĝi ilian ambicion kaj fantazion por la angla lingvo superregi kaj monopoligi super la tuta mondo aŭ oni devas klopodi rekomendi la internaciajn helplingvon Esperanton, kiu respektas la suverenecon kaj egalecon inter ĉiuj landoj. Kaj tio ja estas tre grava problemo inter praveco kaj malpraveco.

En la jaro 2000 mi estis petata de la Esperanta Eldonejo skribi artikolon dediĉitan al la nova jarcento, ĉi tie mi ĝin transskribas ankaŭ kiel la fino de ĉi tiu skribaĵo:

Dum la nova jarcento, ni devas konduki senfine strebadon oponi ĉian hegemoniismon inkluzive la lingvan kampon kaj realigi egalecon inter diversaj nacioj. (fino)  
 eee

## EL «LAŬZI»



### ĈAPITRO 43

(Ĉi tie Laŭzi refoje asertas, ke la mola kaj malforta venkas la malmolan kaj fortan, kaj predikas la avantaĝon de sia "senagado". Li proponas, ke por akiri tian avantaĝon oni devas fari cedojn.)

Tio, kio estas la plej mola sub la Ĉielo<sup>1</sup>,  
 Povas galopi tra tio, kio estas la plej  
 malmola<sup>2</sup>;

La nevidebla forto povas trapenetri tion, en  
 kio estas nenia fendeto;

Jen per tio mi ekkonas la avantaĝon de la  
 "senagado".

La senparola instruado kaj la efiko de la  
 "senagado" estas senkomparaj sub la  
 Ĉielo.

<sup>1</sup> T.e. la akvo.

<sup>2</sup> Ekz. la roko.



### ĈAPITRO 44

(Laŭzi predikas la valorigon de la vivo kaj zorgan memkonservadon, rekomendante ne transpasi la moderecon kaj scii esti kontenta kaj konservativa. Li rigardas tiujn ĉi ideojn kiel sekurigajn rimedojn, per kiuj oni povas liberigi sin de ĉia danĝero.)

Kiu estas la pli kara, la gloro aŭ la vivo?  
 Kiu estas la pli valora, la vivo aŭ la riĉaĵo?  
 Kiu estas la pli malutila, la akiro aŭ la perdo?  
 Tial la troa avaro devas kaŭzi grandegajn  
 elspezojn;

La tro abunda provizo devas suferi seriozan  
 perdon.

Tiu, kiu estas kontenta, renkontas nenian  
 malhonoron;

Tiu, kiu scias halti en bona momento,  
 renkontas nenian danĝeron;

Kaj tial li povas resti por ĉiam en sekureco.



elĉinigiis Wang Congfang

## ☀ Antikvaj Poemoj ☀

*Sur la Cikonio Turo*

Wang Zhihuan

La sun' subiras ĉe l' montaro,  
 River' la Flava fluas al la maro.  
 Se volas plenan vi pejzaĝon,  
 Ascendu plian turetaĝon.

elĉinigis **Wei Lai**

پاپ پاپ

*Printempa Mateno*

Meng Haoran

Mi vekigis je tagiĝ' sen povo  
 Ĝis birdetoj ĉirpas en mateno.  
 Post tutnokta pluvo kaj ventblovo,  
 Multaj floroj falis en ĝardeno!

elĉinigis **Liu Fei**

پاپ پاپ

*La Valo de Birda Kantado*

Wang Wei

Osmantfloroj falas sen vizitoj;  
 Montoj solvas sin en nokt-malplenon.  
 Ŝokis birdojn lunleviĝ' al glitoj;  
 Birdaj ĉirpoj kovras la valĉenon.

elĉinigis **Fang Mei**

صصصصصصصصصصصصصصصصصص

## Privateco

Gu Chunjun

En delikata skatolo kun brila bronza seruro  
 estis ŝlosita la sekreto de mia edzino, kaj  
 ankaŭ mia scivolemo.

Ekde mia geedziĝo kun mia edzino, mi  
 ĉiam aspiris, kiel detektivo, deĉifri la sekreton  
 en la skatolo. Sed ĉiufoje kiam mi  
 alproksimiĝis al ĝi. Ŝi tuj forprenis ĝin, kriante,  
 "Neeble, neeble, ĝi estas Pandora skatolo..."

Pro ŝia insistema alteniĝo, mi ne sukcesis  
 en deĉifrado de la sekreto en ĝi. Kaj dubema  
 nuboj enkaptis mian koron.

Unufoje, kiam amikoj kuniĝis, unu el ili,  
 kiu antaŭ nelonge ekседziĝis, ekparolis flue  
 kun ebria tono pri sia malvenka sperto en amo.  
 Aŭdinte kion li rakontis, mi naskissuspekton:  
 ĉu mia edzino kaŝas nedireblan sekreton?

Stumblinte hejmen, mi puŝvekis ŝin kaj  
 volis ŝin konfesi la sekreton en la skatolon, sed  
 ŝi rifuzis. Mi elprenis ĝin, kriante, "Mi ne  
 konsideras ĉu ĝi estas Pandora aŭ ne!"

La skatolo rompiĝis sub mia pugnobato.  
 Elflugis leteroj kaj fotoj de la enamiĝa  
 tempdaŭro inter mi kaj ŝi...

Vidante mian edzinon kun larmomakulita  
 vizaĝo, mi eksentis subitan sobrecon. Pentemo  
 kaj deprimiteco plenigis mian koron.

Jes, mi rompis la skatolon, des pli sinceran  
 koron!

Mi abrupte venis al la kompreno, ke  
 privateco ekzistas ne nur inter fremduloj, sed  
 ankaŭ inter intimuloj. Fakte, se ni donas al niaj  
 amatoj pli da spaco, pli da respekto kaj  
 malpli da mem-centra vira ŝovaniismo, ni  
 havigas al nia familia vivo pli da peco de  
 serena ĉielo.

elĉinigis **Hongjia**

